# EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

**EKO 2023 / 59. Oktobro 18, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler. Tria kontrolanto dezirata.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 430 KB. Sume: KB 470**

## Aliro por AMO 103 oktobro 19

La temo estas "Virinoj kiuj ŝanĝis la mondon", kun kvar kontribuontoj:

Malfermo kaj prezentaĵo" Virinoj en la Esperanto-movado" (Stefan MacGill)

1. Ermanno Taracchini kaj Laura Barbieri – „Maria Montessori kaj Antonietta Bernardoni, du kuracistinoj kaj pedagog-sciencistinoj, kiuj dediĉis sian vivon al la edukado por nova mondo"
2. Małgosia Komarnicka - "Maria Skłodowska-Curie - simbolo de virina forto"
3. Martha Otto - "Lidia Zamenhof, kiu vere ŝanĝis mian vivon".

La eko okazos malfrue. Ekde 19:00 CEST. (UTC +2)

Zom-Kodo: 899 3887 2466: Pasvorto: 559039

## Film-torento en Usono

EsperantoUSA ĵus publikigis 50 filmetojn en Esperanto por la Bona Filmfestivalo. Tiu ĉi estas la mia, kun samideanoj de la Parma Grupo. Vi povas spekti ĉiujn 50 (pli ol 2 horoj entute!) kaj voĉdoni por la plej ŝatataj klakante "ŝati".
https://youtu.be/3tBgnCB6cjc?si=GM3-9xa-ukezR89l

sendis: Alessandra Madella

## Reago de Dennis Keefe

Mi rigardis vian filmon. Bonege. Mi ne nur montros ĝin al aliaj esperantistoj en Valencio, mi uzos ĝin en Esperanto-Plaĝo 2024. Mi verkos por ĝi instru-materialon, same kiel mi faris por pluraj filmoj de Charlie Chaplin. Nun, tamen, mi serĉas la fonton, ligilon por la aliaj 49 filmetoj.

## Per la evea lingvo informi pri Esperanto

La Afrika Komisiono estas en kontakto kun dudeko da gekomencantoj. Preskaŭ ĉiuj havas universitatan edukitecon kaj do regas la francan. La leciono pli amuzas ilin, pro la fakto ke ili konscias pri sia limo rilate al sia denaska lingvo, la evea. Por ni, tio ja estas io, ke Esperanto iel helpas veki scivolemon ĉe parolantoj de la evea pri sia lingvo.

Adjévi Adje

## Ondo ondas tra la mondo

Konatiĝu kun la septembra 141-paĝa eldono de "La Ondo de Esperanto" (2023, N-ro 317). Kvankam en ĝia fokuso estas la Kongresa Sezono 2023, inkluzive de la 108-a UK en Torino, leginda estas ankaŭ ĝia 68-paĝa sekcio "Kulturo" kun originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj, recenzoj, muzikaj novaĵoj k.a. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2023/10/ondo-117/

## Kursdiluvo oktobra

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Daŭriga kurso
Gvidantonomo: Tiina Oittinen
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Turku, Finnlando. Aldoninto: frans



Paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27580
--------
Nomo: por progresintoj (tria nivelo)
Gvidantonomo kaj aldoninto: François Lo Jacomo
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Parizo, Francio.
Paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27578



----------
Nomo: Unuagrada kaj duagrada kursoj
Gvidantonomo kaj aldoninto: Luigia Oberrauch (sur la foto)
Loko: Parma, Italio.
Paĝoj: https://edukado.net/kursejo?kid=27581 kaj https://edukado.net/kursejo?kid=27586
----------
Nomo: A2 Reta kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: Claudia Maggi
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Pioltello, Italio
---------



Nomo: Zaozhuang-a Universitato
Gvidantonomo: Alessandra Madella (sur la foto dekstre)
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Zaozhuang, Ĉinio
---------
Gvidantonomo kaj aldoninto: Nicola Ruggiero
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Torino, Italio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27585
--------
Nomo: A2 Reta kurso
Gvidantonomo kaj aldoninto: Marco Ciampa
Tipo: Nova movada kurso
Loko: Trento, Italio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27584

## Juna amiko – valora amiko




Esperantistoj devas pli klare agnoski la valoron de la porlernanta revuo *Juna amiko*. Ĝi estas plenkolore ilustrita kun multaj nelongaj allogaj artikoloj en simple legeblaj lingvaĵoj. Jam nun estas tempo reaboni aŭ ekaboni por 2024. Eblas aboni ĝin kun fizike presita revuo aŭ reta versio. La eldonanto ILEI urĝe volas porti la revuon pli proksime al financa ekvilibro.

La revuo estis fondita en 1973 en Hungario; ĝi servis al lernejaj klasoj kaj lernantoj tra la tuta landaro, kiu tiam aliancis sin al Hungario – de Karlovy Vary ĝis Vladivostoko. Ekde 1987 ĝi penetris la okcidentan mondon, inkluzive de Brazilo kaj landoj en Afriko. Do, ĝi iĝis tutmonda. Landaj asocioj, sekcioj kaj lokaj societoj: pripensu la eblon fari kvantan mendon por ke ĉiu el viaj lernantoj havu valoran legaĵon. Rabato por kvantoj ekzistas. Jarabonoj kostas € 18 por A-landanoj kaj €13 por B-landanoj. Por pagmanieroj kaj pliaj informoj, vidu ĉe https://www.ilei.info/revuoj/index.php?lingvo=eo

Rigardu krome ĉe
https://mail.google.com/mail/u/0/?hl=en#inbox/QgrcJHshbMdPCvFdJwFXGTmLzDwDWpJcbPv?projector=1&messagePartId=0.1

## Universitata kunlaboro en Kaunas, Litovio

La 11-an de oktobro 2023 la rektoro de la Universitato Vytautas La Granda en Kaunas prof. habil. D-ro. Juozas AUGUTIS akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj direktoron de la Monda centro de litovoj Valdas Kublius. Estis diskutita kunlaboro inter Litova Esperanto-Asocio kaj la universitato. Estis interkonsentitaj jenaj aferoj:

1. La universitato enkondukos instruadon de Esperanto kiel elekteblan studobjekton. Litova Esperanto-Asocio proponos la instruiston kaj disponigos lernomaterialon.
2. Litova Esperanto-Asocio donacos sian bibliotekon al la universitato.
3. La universitato disponigos ejojn por bezonoj de Litova Esperanto-Asocio kaj por ties havaĵo.
4. Litova Esperanto-Asocio kaj la universitato kunorganizos diversajn aranĝojn. Unue temas pri la 59-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en 2025 en Kaunas helpe de la universitato.
5. La universitato instigos studentojn verki disertaciojn pri la temoj interlingvistiko, esperantologio, lingva politiko, lingva planado kaj similaj.
6. La universitato kaj Litova Esperanto-Asocio efektivigos komunajn eldonprojektojn.

En proksima estonteco la universitato kaj Litova Esperanto-Asocio subskribos kontrakton pri kunlaboro inter ambaŭ flankoj, en kiu aperos ĉiuj listigitaj kaj eventuale aliaj aferoj.

**Povilas JEGOROVAS**

## Festo por Interlingvistoj

Nun haveblas numero 125 de IpI (Informilo por Interlingvistoj). IpI kaj IfI estas eldonitaj de Esperantic Studies Foundation (ESF) kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ili disponigas

informojn kaj ĝisdatigojn pri planlingvoj, interlingvistiko kaj lingvoplanado, kun detaloj pri eventoj kaj novaj publikaĵoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj utilaj informoj por universitatanoj kaj interesatoj pri interlingvistiko.
Artikoloj en IpI ĝenerale nun aperas pli frue en la blogo ESF Connected. Ĉiu numero kolektas artikolojn kaj novaĵojn el la antaŭaj tri monatoj de tiu blogo.

ipi@interlingvistiko.net



## Lerneja informado en Albanio

Okazis prelego pri Esperanto en la gimnazio 'Sami Frasheri' en Tirana, Albanio. Ĉeestis la lernejanoj kaj ties instruistino. Prelegis Bardhyl Selimi kaj Juri Andoni. Kelkaj studentoj petis la lernolibron de Esperanto kaj interesiĝis pri la reta kurso.

## Abundaj filmoj pri AMO 102 en Lignano Sabbadioro

Tio troveblas en la retejo de UEA, en nesufiĉe aprezata kinejo de UEA. SMG unuafoje en la vivo stumblis en ĝin, serĉante ion tute alian.
https://uea.org/aktuale/kinejo

## Andaluzia kurso

Ankaŭ mi prezentis Esperanton al 7 grupoj en mia mezlernejo, proksimume al 150 studentoj (inter 14- kaj 18-jaraĝaj). La mezlernejo estas IES Marqués de Comares, en la urbo Lucena (Andaluzio/Hispanio). Kelkaj el ili interesiĝas multe pri Esperanto kaj volas lerni ĝin. Pasintjare mi enkondukis kurseton en la sama merlernejo: https://sites.google.com/view/tallerdeesperanto .

En la urbo Vélez-Málaga en mezlernejo IES Almenara, kolego Fabián Jiménez, instruas Esperanton en oficiala elektebla kurso, kaj informas en diversaj klasoj pri la lingvo. En Miras de Riotinto (Andaluzio/Hispanio), en IES Cuenca Minera, ankaŭ kolego David Romero, ankaŭ prezentis Esperanton al diversaj grupoj. Pliaj informoj el la estonta ILEI-sekcio en Hispanio: http://ilei.esperanto.es/

Juan Diego

======= vortoj: 1130 ========

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.